



Kun financa subteno de Eŭropa Unio.

La prezentataj vidpunktoj kaj opinioj apartenas tamen nur al la aŭtoro(j) kaj ne nepre akordas kun tiuj de Eŭropa Unio aŭ de la Eŭropa Agentejo por edukado kaj Kulturo (EACEA), kaj nek EU nek EACEA respondecas pri ili.

Finanziato dall'Unione europea. Le opinioni espresse appartengono, tuttavia, al solo o ai soli autori e non riflettono necessariamente le opinioni dell'Unione europea o dell'Agenzia esecutiva europea per l'istruzione e la cultura (EACEA). Né l'Unione europea né l'EACEA possono esserne ritenute responsabili.

Funded by the European Union.

Views and opinions expressed are however those of the author(s) only and do not necessarily reflect those of the European Union or the European Education and Culture Executive Agency (EACEA). Neither the European Union nor EACEA can be held responsible for them.

Project reference: 2021-2-IT02-KA210-ADU-000051431



**Co-funded by
the European Union**

Enhavo – Indice – Contents

Blinduloj kaj alirebleco kulturo kaj arto	5
1. Malkapablo laŭ OMS	5
2. Socia integriĝo kaj kultura integriĝo	6
3. Kulturo	7
4. Sensaj bariloj kaj alireblo	8
5. Sensoj kaj imago. Palpsento	10
6. Konsiloj pri akceptado	12
 I ciechi e l'accessibilità la cultura e l'arte	 18
1. La disabilità secondo l'OMS	18
2. Integrazione sociale e integrazione culturale	19
3. Cultura	20
4. Le barriere sensoriali e l'accessibilità	21
5. I sensi e l'immaginazione. Il tatto	23
6. Consigli per l'accoglienza	26
 Blind people and accessibility culture and art	 33
1. Disability according to the WHO	33
2. Social and cultural integration	34
3. Culture	35
4. Sensory barriers and accessibility	36
5. Senses and imagination. The sense of touch	38
6. Hospitality advice	41
 Akceptema lernejo, unua paŝo al inkluzivo	 47
 Scuola accogliente: primo passo verso l'inclusione	 50
 Welcoming school: first step towards inclusion	 53

BLINDULOJ KAJ ALIREBLECO KULTURO KAJ ARTO

1. Malkapablo laŭ OMS

La Monda San-Organizo (OMS) en 1980 kaj 2001 difinas kajposte pliprofundigas la konceptojn **kripleco**, **malkapablo** kaj **handikapo**.

Kripleco estas fizika aŭ funkcia difekto dumtempa aŭ permanenta (lameco, blindeco ks). Kontraŭ kripleco, se ĝi ne estas kuracebla, estas neniu rimedo.

Malkapablo, pro kripleco, malebligas efektiviĝi diversajn funkciojn (blindulo ne povas vidi, lamulo ne povas kuri).

Handikapo estas la graveco de malavantaĝo kaŭzata de kripleco rilate al socikulturaj funkcioj aparte gravaj en tiuspeca socio. Handikapo de nekapablo legi estas pli malfavora en evoluinta socio, ol en socio en kiu preskaŭ ĉiuj estas analfabetoj. Socio estigas handikapon pro la plenumoj kiujn ĝi postulas, sed povas ĝin forigi, se ĝi disponigas al la koncernato tion, kio povas malgravigi aŭ forigi la sekvojn de la kripleco: protezon al kiu ne povas kuri; komputilon kun voĉsintezilo aŭ brajla ekranilo al kiu ne povas legi per la okuloj. Handikapo estas do io relativa; ĝi estas socimedia sekvo kiun socio povas igi minimuma aŭ eĉ forigi.

2. Socia integriĝo kaj cultura integriĝo

En socio moderna kaj demokratia fundamenta estas egaleca kondiĉo. Tio validas ankaŭ por portanto de **handikapo**, kiu, kiel montras la vorto mem, havas malavantaĝon malebliganta al li esti egala. La socio devas garantii la esence politikan sindevigon forigi tiun malavantaĝon. Blinduloj, ekipitaj per la necesaj iloj kaj per la eblaj kondiĉoj (instruado kaj asistado) povas faligi multajn el la bariloj malebligantaj "normalan" vivon. Nuntempe blinduloj (ne ĉiuj, bedaŭrinde) povas lernadi, plenumi pagatan laboron, krei propran familion. Tiuj estas la necesaj kondiĉoj por atingi efektivan egalecon en reto de integritaj rilatoj.

Integriĝo (aŭ **inkluziviĝo** kiel hodiaŭ multaj preferas) signifas la eblecon fari kune kun aliaj ĉion kion aliaj faras. "Fari" en la senco kune partopreni ne nur la agojn, sed ankaŭ la informojn, la diskutadon, la planadon. Tio estas la esenco de "vivi kune". Por blinduloj, vivintaj dum jarcentoj en kondiĉoj de absoluta elmarĝenigo (blindulo estas malsamulo; la maksimumo kiun li povas fari estas almozpeti) **socia integriĝo** signifas foriron el socia elmarĝeniĝo kaj eniron en la mondon de homoj.

La komenciĝo de tiu procezo okazas en la unua duono de la deknaŭa jarcento kiam Louis Braille elpensis la skribmetodon kiu portas lian nomon. Tio signas por blinduloj la transiron el prahistorio al historio.

3. Kulturo

Por vera **integriĝo** ne sufiĉas kundiĉi lokojn kaj agadojn: ne ekzistas **socia integriĝo** sen **kultura integriĝo**. Ne sufiĉas "fari" kun aliaj; necesas "pensi" kun aliaj. Ekzemple, blindulo kiu, agante en komunumo, ne povas tamen partopreni en diskutoj kaj en konfrontiĝo pri la objekto, sed eĉ en la distroj de la libera tempo, restas ekskluzivito. Nur kulturo, signifanta posedon de informoj kaj kapablon elabori ideojn, povas plenumi la miraklon venki la handikapon kaj realigi veran **inkluziviĝon**. Tiucele esencaj estas posedo de la skribo kaj de la iloj nuntempe necesaj por komunikado kaj akiro de informoj: informadikaj helpiloj akireblaj kaj facile uzeblaj.

Nuntempe en la kultura formiĝo kaj en la utiligo de libera tempo kreskas la graveco de turismo kaj vizito al kulturlokoj (muzeoj, arkeologiaj lokoj, artaj urboj, teatroj ktp). Ĝis antaŭ malmultaj jardekoj blindulo estis praktike senigita de ĉio tio: li devis ankoraŭ konkeri, eĉ en la plej evoluintaj socioj, la fundamentajn rajtojn: instruadon, socian asistadon, laboron. Nuntempe lia socia kondiĉo estas ankoraŭ tre malproksima de perfekteco, sed en multaj landoj ni ne plu troviĝas ĉe la jaro 0. Tial multaj blinduloj, serĉe de pli supera integriĝo, volas mem partopreni en pli altnivelaj agadoj kaj postulas aliron al plena ĝuado de kulturo kaj plenan agnoskon de tiu rajto.

Eblas ja paroli pri rajto, ĉar ĝin sankciis la Deklaracio

de Homaj Rajtoj de Unuiĝintaj Nacioj proklamita la 10an de Decembro 1948. En ĝia art. 27 oni povas legi, ke ĉiuj homaj estaĵoj rajtas ĝui kulturon kaj arton, koncepto ripetita en art. 30 de la Deklaracio de la Rajtoj de Handikapuloj de la Ĝenerala Asembleo de UNO de la 13-1 de Decembro 2006. El tio sekvas, ke la ebleco por handikapuloj (kaj do ankaŭ por blinduloj) ĝui la kulturajn riĉaĵojn ne povas esti konsiderata kiel "bonvola permeso", sed kiel homa rajto kaj devo de la socio garantii ĝin al ĉiuj.

4. Sensaj bariloj kaj alireblo

Alireblo konsistas esence en la manko de bariloj malebligantaj al difinita homa kategorio aliri lokon aŭ servon. Ekzistas diversaj tipoj de bariloj:

a) movbariloj por tiuj kiuj marŝas malfacile kaj devas utiligi ekzemple rulseĝon (ŝtupoj kaj ŝtuparoj, pordoj tro mallarĝaj, vojoj serpentumaj aŭ tro krutaj, pavimo misaranĝita kaj nesekura ktp). Movmalfacilaĵoj povas esti diversgradaj kaj trudi diversajn necesojn. Bariloj povas esti interne de la loko aŭ ekstere de ĝi, koncerni la alvenvojojn aŭ la veturilojn.

b) ekzistas **sensbariloj** koncernantaj surdulojn kaj blindulojn: rilate surdulojn, bariloj konsistas esence el manko aŭ nesudiĉo de vidaj informoj aŭ de simpligitaj tekstoj. Rilate blindulojn, male, ĝuste vidaj informoj konsistigas por ili barilojn.

c) Sed ekzistas ankaŭ **kulturaj bariloj**: informoj

malfacilaj aŭ vortigitaj en lingvaĵo tro malfacila aŭ netaŭga por iuj kategorioj (ekz.e infanoj); uzado de nur unu lingvo aŭ de nur unu fremda lingvo (kutime nur la angla krom la enlanda, kvazaŭ la tuta mondo bone konus la anglan!).

Parolante pri vidhandikapuloj oni devas distingi inter tute blindaj homoj kaj malfortevidantoj, kiuj vidas malmulte kaj malbone. Ĉi-lastaj povas kutime uzi vidpovon aldone al palpsenso, sed malfacile kaj per helpo de iuj iloj (lensoj, grandigiloj, lumsendiloj ktp) kaj kiam ekzistas taŭga lumigado.

Rimarkinde estas, ke blindulo aŭ malfortevidanto, manke de aldonaj kriplaĵoj, povas esti ĝenata de movbariloj, kiuj tamen ĝenerale ne malhelpas lin, precipe se li estas akompanata, moviĝi, trairi ŝtuparojn, venki normalajn obstaklojn. Sed la plej gravaj bariloj por vidhandikapulo estas la sensaj bariloj: la uzo de informoj nur vidaj: lumindikoj, vidulskribaj paneloj, indikoj per koloroj, broŝuroj vidulskribaj kaj eble eĉ kun presliteroj tre malgrandaj kaj palaj, videoj kaj projekcioj enhavantaj nur bildojn sen parolaj klarigoj, ktp.

Por garantii al vidhandikapuloj **alireblecon** al lokoj kaj servoj, necesas aldoni al lumindikoj ankaŭ sonindikojn, al informoj vidulskribaj ankaŭ parolajn klarigojn kaj brajlajn tekstojn, al projekcio de vidaj bildoj - ties priskribon.

Aparte grava estas la akcepto flanke de sperta personaro.

La plej granda malamiko de vidhandikapulo, speciale en muzeo aŭ alia kulturloko, estas la kutima admonŝildo: "Palpado malpermesita".

La sensoj kapablaj percepti la fizikan formon de aĵoj estas nur vid- kaj palpsenso. Se al blindulo oni malpermesas palpi, oni kondamnas lin al vera blindeco.

5. Sensoj kaj imago. Palpsento

Ne ekzistas nur vidaj imagbildoj. Imagbildo estas memoraĵo pri sensa percepto ebliganta al ni revoki ĝin al nia memoro kaj ĝin prezenti al ni konkrete. Ekzistas do imagbildoj vidaj, aŭdaj, .. flaraj, palpaj kaj gustaj.

La memoro pri tiuj sensaĵoj akompanantaj kutime la ekkonon de objekto estas nemalhavebla, se ni volas paroli pri tiu objekto. Al la komenca sensaĵo aldoniĝas la informoj, kiuj kun ĝi konsistigas la konkretan koncepton. Abstrakta koncepto (libero, kono, amikeco ktp) ne bezonas ligiĝi al iu sensaĵo.

Parolante pri fizikaj objektoj la percepto de formo (domo, besto, ŝuo...) akiriĝas per vidpovo. Por blindulo ĝi estas akirebla nur per palpesploro; alie, priskribo, eĉ detala, ne sufiĉas por ke li povu prezenti ĝin al si percepteble. "Palpado malpermesita" forprenas de blinduloj la efektivan eblecon akiri konkretan konon pri la aĵoj. Oni asertas, ke la malpermeso de palpado necesas por garantii gardadon de la integreco de objekto (ekz.e artverko). Sed tio estas vera nur en

sufiĉe maloftaj kazoj: la vero estas ke nia kulturo, ĉiam ekde Platono, proklamas la "noblecon" de vidado, kaj konsideras palpsenson malsupera, pli materia kaj pli danĝera.

Male, palpsenso, kiel ĉiuj ceteraj sensoj, havas proprajn specifecojn kaj grandan riĉecon de sensaj nuancoj, kiuj povas doni rafinitan estetikan valoron al palpsensaj sensaĵoj.

Ĉu blinduloj sukcesas per palpsenso kompreni kaj estetike ĝui artverkon? Jen temo, pri kiu kompetentuloj diskutadas depost Diderot dum preskaŭ tri jarcentoj. La sperto de Muzeo Homero, Ŝtata Tuŝsensa Muzeo en Ancona (Italujo) kaj de ĝia teoria pristudado donas klaran jesan respondon. Tion plene konfirmas la entuziasmo de multaj blindaj vizitantoj. Palp-esplorado de statuo aŭ bareliefo ebligas al blinduloj konstrui mensan bildon pri la esplorata objekto, kaj eltiri el ĝi ĉiajn informojn, signifojn, simbolojn, kiujn ankaŭ vidantoj ricevas, kaj la senton pri simetrio, harmonio kaj spacaj rilatoj, kiujn la formo proponas. Ni jam substrekiĝis, ke la ununuraj sensoj kapablaj percepti la fizikan formon estas vidsenso kaj palpsenso. Sed koncerne artĝuadon ludas gravan rolon ne nur la formo. Ekzistas perceptaĵoj specife palpsensaj kaj absolute ne riceveblaj tra aliaj senskanaloj. Pezo, temperaturo, konsisto estas percepteblaj nur per palpado, kaj ili proponas tre riĉan gamon da kombinaĵoj kaj nuancoj agrablaj aŭ malagrablaj, kiuj gravas en la estetika prezento. Manoj povas "vidi" tion, kion okuloj

ne vidas. Tiu fakto koncernas ne nur blindulojn, ĉar ankaŭ vidantoj havas manojn!

Kompreneble gravas scii, kiel oni devas palpi. Palpi aĵon belan kaj interesan povas esti ago ama: plibone uzi la verbon "karesi". Ne eblas ne karesi kion ni amas: "Karesi" signifas starigi fortan ameman rilaton kun la objekto, uzante la tutajn delikatecon kaj atenton necesajn por gardi la integrecon de la objekto, multe pli bone ol per bariloj kaj protektaj kristaloj.

6. Konsiloj pri akceptado

La antaŭaj paragrafoj celas fari sintezon de iuj ŝlosilaj konceptoj necesaj por starigi bonkvalitan kunlaboran rilaton kun publiko el vidhandikapuloj. Celo de la nuna laboro estas plifaciligi partoprenon de blinduloj en esperantistaj renkontiĝoj, kaj speciale en kulturaj kaj artaj eventoj. Ĉi tie estus sufiĉe senutile insisti pri la forigo de arkitekturaj bariloj en la loko, kie la renkontiĝo okazas: estas neimageble, ke la esperantistaj organizantoj povus rekte interveni en la solvo de kompleksaj problemoj pri kiuj kompetentas publikaj institucioj, kaj kiuj postulas la disponigon de grandaj financaj kaj organizaj povoj. Ili povas male aparte atenti, kiam eble, por eviti ke kiel sidejo de la evento estu elektataj lokoj evidente maloportunaj por la partopreno de handikapuloj. Tio aparte gravas kiam temas pri la elekto de konstanta sidejo, kiel ekzemple la loko kie ordinare okazas la renkontiĝoj kaj agadoj de

la loka esperantista grupo aŭ asocio. Ĉi-kaze oni povas forigi iujn moveblaĵojn, kiuj ĝenas la cirkuladon: ekzemple seĝoj, tabloj, dekorpotoj kaj aliaj obstakloj dismetitaj en pasejoj aŭ en nekutimaj lokoj; objektoj elstarantaj en pasejoj, ĉefe se je alto danĝera por la kapo kaj la vizaĝo; tro malforta aŭ tro forta lumigo kiu povas akre ĝeni homojn kun vidaj malfacilaĵoj eĉ momentaj; informaj paneloj malfacile legeblaj; retpaĝaro nealirebla; lifta klavaro sen brajlaj ciferoj, ktp.

Tamen, konsiderinte la neebulon konkrete modifi la fizikan kaj organizan strukturon de la loko elektita por la agado, fariĝas fundamente aranĝi la akceptadon. Ni parolas, kompreneble, pri blinduloj neakompanataj, sed kun ia mova memstareco. Estus tre grave, ke en la personaro de la organizo troviĝus iu specife taskita interveni por helpi homojn en malfacila situacio. Tiu devus kompreneble posedi iajn specifajn konojn, ne malfacile akireblajn per kontaktoj kun la lokaj handikapulaj organizaĵoj.

Jen kelkaj praktikaj indikoj.

* * *

La supre menciita helpanto havu telefonnumeron komunikitan en ĉiuj informiloj pri la evento, tiel ke handikapulo povos peti konsilojn aŭ helpon laŭbezzone. Se la celo estas soci-media inkluzivo, la plej utilan rimedon konsistigas la partoprenantoj mem en la evento, kiujn devus motivigi kunsentiga kampanjo pri

la problemo, tiel ke oni povu poste kalkuli je efektiva kunlaboro.

Se blindulo estas sen akompananto, kiu ajn devus aliri lin sen la timo esti maldiskreta, prezenti sin, peti lian nomon, starigi konkretan rilaton per forta manpremo, bonvenigi lin, demandi ĉu li bezonas ion, alproksimigi lin laŭ lia deziro al grupo eventuale jam stariginta kunulan etoson, demandi lin kion li deziras fari kaj ne trudante al li tion kion nj dezirus ke li faru. Ni zorge evitu trakti lin, kiel tre ofte okazas, kvazaŭ infanon, mem decidante anstataŭ li, kion fari kaj kiel fari ĝin.

Parolante al blindulo, ni parolu rekte al li, kaj ne al tiuj kiuj lin ĉirkaŭas; pli klare dirite, ni evitu paroli nur al la homoj kiuj rigardas nin en la vizaĝon, fakte ekskluzivante tiujn, kiuj ne povas tion fari.

Ni ne laŭtigu nian voĉon parolante al blindulo bonege aŭdanta, kaj ĉiam memoru priskribi la aĵojn pri kiuj ni parolas; ni ne simple indiku ilin, kiel ofte okazas, per la mano, kaj, tre grave, se tio estas ebla kaj signifa, ni ebligu al li tuŝi ilin.

Ni ne zorgu eviti ĉiujn vortojn kiuj iel rilatas al vidpovo: lingvaĵo apartenas al ĉiuj, kaj kun blinduloj ni devas uzi ĉies lingvaĵon.

Ni memoru konduti ĉiam tute nature: embaraso naskas embarason, kaj se ni parolos senĝene ankaŭ pri aferoj koncernantaj la handikapon, ĉio fluos pli simple kaj senĝene.

Se vi kune sidas ĉe tablo en kafejo aŭ restoracio,

helpu la blindulon mendi, avertu lin kiam alvenas sur la tablon la glaso aŭ la telero kaj eble eĉ faru ke li tuŝu ilin.

Se li petas komplezon postulantan iun koston, permesu ke li pagu sian parton, ne rifuzante pro ĝentileco lian monon; tiel li ne sentos embarasiĝon se alifoje li devos peti alian similan komplezon.

Se blindulo petas vin akompani lin, donu vian brakon, ne prenu vi la lian; tiel vi marŝos kelkajn centimetrojn antaŭe kaj la nevidanto sekvos vin paŝon post paŝo kaj sentos sin sekura ĉar, tenante vian brakon, li perceptos ĉiujn viajn movojn kaj ilin ripetos aŭtomate.

Ĉe ŝtupoj ne ektimu; se vi ne agos heziteme la blindulo ripetos trankvile viajn movojn, inkluzive de tiuj por supreniri aŭ malsupreniri ŝtupojn. Manke de reciproka alkutimiĝo, vi povas averti lin pri komenciĝo kaj finiĝo de la ŝtuparoj, sen bezono de halto. Sed, tre grave, alirante ŝtupon aŭ ŝtuparon, ĉiam venu al ili ortangule, ne oblikve, ĉar en la dua kazo, la blindulo ne atingos la ŝtupon samtempe kun vi, sed pli frue aŭ pli malfrue, kun la imageblaj sekvoj.

* * *

Dum esperantistaj eventoj povas okazi, ke oni enprogramigis vizitojn al muzeoj kaj kulturlokoj. Kiamaniere eblas aranĝi la partoprenon ankaŭ de eventualaj vidhandikapuloj? Jen la plej malfacila defio, ĉar, pro solidiĝinta tradicio, muzeologio konsideras arton kiel fenomenon esence vidan.

Manke de specialaj help-informiloj (palpaj aŭ parolaj) oni povas fakte anstataŭigi ilin akompanante la blindulon kaj voĉlegante por li ĉiujn skribitajn klarigojn kaj aldonante priskribon, kvankam supraĵan, de ĉiuj bildoj entenataj en paneloj, en videoj, en projekcioj ktp.

Kompreneble oni neniam forgesu ebligi al li palpi ĉion palpeblan, eĉ kiam temas pri detaloj ŝajne sensignifaj: la senco de la tuto eliĝos el la kunteksto, kaj la detalo ŝajne malgrava por eksterulo, povos male fariĝi tre signifa.

La estetikan sperton liveratan de kompleksa medio konsistigas kvanto de informoj kaj sensaĵoj. Ĉiuj kunagas en la stimulado de emocio riĉa je konsistigaj elementoj. Kaj, se al blindulo mankas la vidaj stimuloj, ne povas manki la ceteraj, kiuj, ĉiuj kune, plenigas la malplenon kaŭzatan de la manko de vidpovo. Plursenseco estas kondiĉo lasanta ĉiam al tiuj, al kiuj mankas unu el la sensoj, la kompensadon donitan de la ceteraj.

D-ro Aldo Grassini



I CIECHI E L'ACCESSIBILITÀ LA CULTURA E L'ARTE

1. La disabilità secondo l'OMS

L'organizzazione Mondiale della Sanità (OMS) nel 1980 e nel 2001 definisce e poi approfondisce i concetti di menomazione, di disabilità e di handicap.

La **menomazione** è un difetto fisico o funzionale temporaneo o permanente (la zoppia, la cecità ecc.). Contro la menomazione, se non può esser curata, non c'è nulla da fare.

La **disabilità**, a causa della menomazione, impedisce di compiere determinate funzioni: un cieco non può vedere, uno zoppo non può correre.

L'**handicap** è l'importanza dello svantaggio prodotto da una menomazione rispetto a funzioni socioculturali particolarmente importanti in quel tipo di società. L'handicap di non poter leggere è più grave in una società evoluta che in una società dove quasi tutti sono analfabeti. La società produce l'handicap per le prestazioni che richiede, ma può rimuoverlo se fornisce al soggetto ciò che serve per ridurre o annullare gli effetti della menomazione: una protesi a chi non può correre; un computer con sintesi vocale o barra Braille per chi non può leggere con gli occhi. Dunque, l'handicap è relativo, è un prodotto socio-ambientale che la società può minimizzare o addirittura rimuovere.

2. Integrazione sociale e integrazione culturale

In una società moderna e democratica è fondamentale la condizione dell'uguaglianza. Ciò vale anche per un portatore di handicap che, come dice il termine stesso, ha uno svantaggio che gli impedisce di esser uguale.

La società deve garantire l'impegno essenzialmente politico a rimuovere questo svantaggio. I ciechi, se dotati degli strumenti necessari e delle condizioni possibili (l'istruzione e l'assistenza) possono abbattere molte delle barriere che impediscono di vivere una vita "normale".

Oggi, i ciechi (non tutti, purtroppo) possono studiare, avere un lavoro retribuito, crearsi una famiglia. Sono queste le condizioni indispensabili per raggiungere un'effettiva uguaglianza in una rete di rapporti integrati. Integrazione (o inclusione, come oggi molti preferiscono) significa poter fare insieme agli altri tutto ciò che gli altri fanno. "Fare" nel senso di condividere non solamente le azioni, ma anche l'informazione, la discussione, la progettazione. È questa l'essenza del "vivere insieme".

Per i ciechi, vissuti per secoli in una condizione di assoluta emarginazione (il cieco è un diverso; il massimo che può fare è chiedere l'elemosina), l'integrazione sociale rappresenta il riscatto dall'esclusione e l'ingresso nel mondo degli uomini.

L'inizio di questo processo cade nella prima metà del

XIX secolo, quando Louis Braille inventò il sistema di scrittura che da lui prende il nome. Per i ciechi è questo il passaggio dalla preistoria alla storia.

3. La cultura

Perché ci sia autentica integrazione non basta condividere i luoghi e le attività: non c'è integrazione sociale se non c'è integrazione culturale. Non basta "fare" con gli altri; bisogna "pensare" con gli altri. Per esempio, un cieco che mentre opera in una comunità non è in grado di partecipare alla discussione ed al confronto sull'oggetto, ma neppure alle divagazioni del tempo libero, resta un escluso. Soltanto la cultura, intesa come possesso dell'informazione e capacità di elaborare le idee, può compiere il miracolo di sconfiggere l'handicap e di realizzare una vera inclusione. A questo fine sono essenziali il possesso della scrittura e degli strumenti oggi indispensabili per la comunicazione e l'acquisizione dell'informazione: gli ausili informatici accessibili e di facile uso.

Oggi nella formazione culturale e nell'uso del tempo libero hanno crescente importanza il turismo e la visita ai luoghi della cultura (musei, siti archeologici, città d'arte, teatri ecc.). Fino a pochi decenni or sono, il cieco ne era praticamente escluso: doveva ancora conquistare, anche nelle società più evolute, i diritti fondamentali: l'istruzione, l'assistenza sociale, il

lavoro.

Oggi la sua condizione sociale è ancora assai lontana dalla perfezione, ma in molti Paesi non siamo più all'anno zero. Così molti ciechi, alla ricerca di un'integrazione più avanzata, vogliono anch'essi partecipare ad attività di più alto livello e chiedono l'accesso alla piena fruizione della cultura ed il riconoscimento di questo diritto.

Si può parlare di diritto poiché ciò è sancito dalla dichiarazione dei diritti umani delle Nazioni Unite proclamata il 10 dicembre 1948. All'art. 27, si può leggere che tutti gli esseri umani hanno diritto alla fruizione della cultura e dell'arte, concetto ribadito nell'art. 30 della Dichiarazione dei diritti delle persone disabili dell'Assemblea Generale delle Nazioni Unite del 13 dicembre 2006.

Ne consegue che la fruizione dei beni culturali da parte dei portatori di handicap (e quindi anche dei ciechi) non può essere considerata come una "graziosa concessione", ma come un diritto umano ed un impegno della società a garantirlo a tutti.

4. Le barriere sensoriali e l'accessibilità

L'accessibilità consiste essenzialmente nell'assenza di quelle barriere che impediscono ad una categoria di persone di accedere ad un luogo o ad un servizio.

Ci sono diversi tipi di barriere:

a) barriere motorie per chi ha difficoltà nel camminare e deve usare, per esempio, la

carrozzina (gradini, scalinate, porte troppo strette, percorsi tortuosi o troppo ripidi, impiantito sconnesso e poco sicuro ecc.). Ci sono vari gradi di disabilità motoria con esigenze più o meno importanti. Le barriere possono essere interne al luogo od esterne, riguardare le vie di avvicinamento o i mezzi di trasporto.

b) Ci sono **barriere sensoriali** che riguardano i sordi e i ciechi: quanto ai sordi le barriere riguardano essenzialmente la mancanza o l'insufficienza di informazioni visive o di testi semplificati. Quanto ai ciechi, invece, proprio le informazioni visive costituiscono per loro delle barriere.

c) Ma esistono anche **barriere culturali**: informazioni difficili o espresse in un linguaggio troppo difficile o inadatto a certe categorie (p.es. ai bambini); l'uso di una sola lingua o di una sola lingua straniera (di solito solo l'inglese oltre alla lingua del Paese, come se tutto il mondo avesse una buona conoscenza dell'inglese!).

Quando si parla di disabili visivi bisogna distinguere i ciechi assolutamente privi della vista e gli ipovedenti che vedono poco e male. Questi ultimi di solito possono servirsi della vista in aggiunta al tatto, ma con difficoltà e con l'aiuto di alcuni strumenti (lenti, ingranditori, piccoli proiettori della luce ecc.) e in presenza di un'illuminazione idonea.

Da notare che un cieco od un ipovedente, se non è affetto da altre menomazioni aggiuntive, può essere

infastidito dalle barriere motorie, ma generalmente esse non gli impediscono, specie se è accompagnato, di muoversi, fare le scale, superare ostacoli normali.

Ma le barriere più gravi per un disabile visivo sono le barriere sensoriali dovute all'uso di sole informazioni visive come segnali luminosi, pannelli scritti in nero, indicazioni colorate, opuscoli stampati in nero e magari con caratteri troppo piccoli e troppo sfumati, video e proiezioni contenenti solo immagini visive senza spiegazioni vocali, ecc.

Per garantire ai disabili visivi l'accessibilità dei luoghi e dei servizi è indispensabile aggiungere ai segnali luminosi anche segnali acustici, alle informazioni scritte in nero, spiegazioni vocali e testi scritti in braille, alla proiezione di immagini visive la loro descrizione. Particolarmente importante è l'accoglienza esercitata da persone preparate.

Il maggior nemico di un disabile visivo, specialmente in un museo o in un luogo della cultura, è rappresentato dal solito cartellino con la scritta "vietato toccare". I soli sensi capaci di cogliere la forma fisica delle cose sono la vista e il tatto. Se ad un cieco si impedisce di toccare lo si condanna ad una cecità vera.

5. I sensi e l'immaginazione. Il tatto

Non esistono soltanto immagini visive. L'immagine è il ricordo di una percezione sensoriale che ci consente di richiamarla alla memoria e di rappresentarcela

concretamente. Esistono pertanto immagini visive, acustiche, olfattive, tattili e gustative. Il ricordo di quelle sensazioni che si accompagnano, di solito, alla prima conoscenza di un oggetto, è imprescindibile se si vuol parlar di quell'oggetto. Alla sensazione iniziale si aggiungono le informazioni che insieme ad essa vanno a costituire il concetto concreto. Un concetto astratto (libertà, conoscenza, amicizia ecc.) non ha bisogno di collegarsi ad alcuna sensazione. Se parliamo di oggetti fisici, la percezione della forma (un palazzo, un animale, una scarpa...) è acquisita mediante il senso della vista; per un cieco essa è accessibile soltanto attraverso un'esplorazione tattile, altrimenti una descrizione, anche accurata, non sarà sufficiente a far sì che egli riesca a rappresentarsela sensibilmente. Il "vietato toccare" toglie ai ciechi l'effettiva possibilità di avere una conoscenza concreta delle cose.

Si dice che il divieto del toccare si rende necessario per garantire la salvaguardia dell'integrità dell'oggetto (p.es. un'opera d'arte). Ma ciò è vero in casi abbastanza rari: la verità è che la nostra cultura, da Platone in poi, esalta la "nobiltà" del vedere e considera il tatto come un senso inferiore, più materiale e più pericoloso.

Invece il tatto, come tutti gli altri sensi, ha le sue specificità e una grande ricchezza di sfumature sensoriali che possono conferire un raffinato valore estetico alle sensazioni tattili.

I non vedenti riescono a capire ed apprezzare

esteticamente un'opera d'arte con il loro senso del tatto?

Gli esperti dibattono su questa domanda da Diderot cioè da quasi tre secoli.

L'esperienza del Museo Omero, il Museo Statale Tattile di Ancona (Italia) e del suo studio teorico fornisce una chiara risposta affermativa. Questo è pienamente confermato dall'entusiasmo di molti visitatori non vedenti.

L'esplorazione tattile mirata di una statua o di un bassorilievo consente ai non vedenti di costruirsi un'immagine mentale dell'oggetto toccato e di estrarne tutte le informazioni, i significati e i simboli che ricevono anche i vedenti come ad esempio, la simmetria, l'armonia e le relazioni spaziali che la forma offre. Abbiamo già sottolineato che gli unici sensi in grado di percepire la forma fisica sono il senso della vista e il senso del tatto.

Ma per quanto riguarda l'arte, non solo la forma gioca un ruolo importante. Ci sono percezioni che sono specificamente tattili e che non possono assolutamente essere ricevute attraverso altri canali sensoriali. Peso, temperatura, composizione sono percepibili solo al tatto, essi offrono una ricchissima gamma di accostamenti e sfumature, piacevoli o sgradevoli ma certamente importanti nell'apprezzamento estetico. Le mani possono "vedere" ciò che gli occhi non possono. Questo fatto non riguarda solo i ciechi, perché anche i vedenti hanno le

mani!

Naturalmente è importante comprendere come si deve toccare. Toccare una cosa bella e interessante può essere un atto d'amore: meglio usare il verbo "accarezzare". Non si può fare a meno di accarezzare ciò che amiamo: "accarezzare" significa stabilire un forte rapporto affettivo con l'oggetto ed usare tutta la delicatezza e l'attenzione necessarie per tutelare l'integrità dell'oggetto assai meglio delle transenne o delle vetrine.

6. Consigli per l'accoglienza

I precedenti paragrafi cercano di fare una sintesi su alcuni concetti chiave, indispensabili per stabilire un rapporto di collaborazione corretto con un pubblico di disabili visivi. Lo scopo di questo lavoro è quello di facilitare la partecipazione dei ciechi agli incontri esperantisti e specialmente ad eventi culturali ed artistici.

In questa sede sarebbe abbastanza inutile insistere sull'eliminazione delle barriere architettoniche nel luogo in cui si svolge l'incontro: è impensabile che gli organizzatori esperantisti possano intervenire direttamente nella soluzione di problemi complessi di competenza delle istituzioni pubbliche e richiedenti l'impegno di grandi risorse finanziarie e organizzative.

Essi possono invece prestare particolare attenzione, quando è possibile, ad evitare di scegliere quale sede

dell'evento luoghi chiaramente inadatti alla visita delle persone disabili. In particolar modo, quando si tratta di scegliere una sede fissa, come per esempio, il luogo dove si svolgono in via permanente le riunioni e le attività di un gruppo esperantista locale o dell'associazione.

In questo caso si possono eliminare alcuni ostacoli mobili che infastidiscono la circolazione; p.es. sedie, tavoli, vasi ornamentali ed altri ostacoli collocati in punti di passaggio o in posizioni inconsuete; oggetti sporgenti dalla linea di passaggio, specie se a una certa altezza, pericolosa per il capo e per il viso; un'illuminazione troppo tenue o troppo forte in grado di infastidire decisamente chiunque abbia problemi di vista anche temporanei; pannelli informativi di difficile lettura; un sito nella rete non accessibile; una tastiera senza numerazione in braille nell'ascensore ecc. Ma, considerata l'impossibilità di modificare concretamente la struttura fisica e organizzativa dell'ambiente scelto per operare, la cosa fondamentale diventa agire sull'accoglienza. Qui si sta parlando, ovviamente, di ciechi non accompagnati e quindi di persone dotate comunque di una certa autonomia.

Sarebbe molto importante che tra gli operatori dell'organizzazione ci fosse qualcuno specificamente incaricato di intervenire in aiuto di persone in situazione di disagio.

Ovviamente dovrebbe possedere un minimo di formazione che non sarebbe difficile acquisire tramite

contatti con le locali organizzazioni dei disabili.
Ecco alcuni suggerimenti pratici.

* * *

La persona di cui sopra dovrebbe disporre di un numero di telefono comunicato in tutti gli strumenti informativi sulla manifestazione. Il disabile potrebbe chiedere consiglio od aiuto in caso di bisogno.

Se l'obiettivo è l'inclusione socio-ambientale, la risorsa più utile sono i partecipanti stessi alla manifestazione, i quali dovrebbero esser motivati da una campagna di sensibilizzazione sul problema in modo da potersi poi contare su una collaborazione effettiva.

Se un cieco si presenta da solo, chiunque dovrebbe avvicinarlo senza il timore di essere indiscreto, presentarsi, chiedere il suo nome, stabilire un rapporto concreto attraverso una vigorosa stretta di mano, dargli il benvenuto, chiedergli se ha bisogno di qualcosa in particolare, avvicinarlo, se lo gradisce, a qualche gruppo che sta già vivendo un momento di aperta socialità, chiedergli sempre che cosa desidera fare e non imporgli ciò che noi vorremmo che facesse. Evitare attentamente di trattarlo, come assai spesso accade, come un bambino, decidendo noi al suo posto cosa fare e come farlo.

Se si parla con un cieco, rivolgiamoci direttamente a lui e non alle persone che gli stanno intorno; più particolarmente, evitiamo di parlare soltanto alle

persone che ci stanno guardando in faccia, escludendo di fatto chi non può farlo. Non alziamo il tono della voce, se parliamo con un cieco che ci sente benissimo e ricordiamo sempre di descrivere le cose di cui stiamo parlando e non facciamo, come spesso accade, che le citiamo semplicemente indicandole magari con la mano e, soprattutto, se la cosa è possibile e importante, facciamogliele toccare!

Non poniamoci il problema di evitare tutte le parole che hanno un nesso con la vista: il linguaggio è di tutti e con un cieco bisogna usare il linguaggio di tutti. Ricordiamoci di essere sempre assolutamente naturali: l'imbarazzo genera imbarazzo e se parliamo con leggerezza anche di cose che riguardano la minorazione, tutto sarà più semplice e leggero.

Se siete seduti al tavolo di un bar o di un ristorante, aiutate il non vedente a ordinare, avvertitelo quando arriva sul tavolo il bicchiere o il piatto e, magari, fateglielo toccare. Versategli da bere, se lo vedete in difficoltà, e chiedetegli se ha bisogno di un aiuto per tagliare la carne od altro.

Se vi chiede un favore che comporta una qualsiasi spesa, consentitegli di pagare la sua parte senza voler imporre la vostra gentilezza fino a rifiutare il denaro, affinché un'altra volta non si senta in difficoltà se deve chiedere qualcos'altro.

Se un cieco vi chiede di accompagnarlo, offritegli il braccio, non siate mai voi a prenderlo. In questo modo voi camminerete qualche centimetro più avanti e la

